

tempo

Gazeto de Kroata Esperanto-Ligo
Ĉasopis Hrvatskog saveza za esperanto

Junio 2025 / n-ro **145**



La 13a kongreso de kroataj esperantistoj en Slavonski Brod



Zora Heide – la centa vivjubileo!



Višnja Katalinić prelegis en Graz ĉe Aŭstria Esperanto-Kongreso



Nokto de la muzeoj ĉe esperantistoj

Jen Tempo numero 145! Ni publikigas ĝin en agrabla printempo, dum ne tiel malproksime de nia same slava lando **Kroatio** daŭre okazas la milito inter ambaŭ slavaj landoj **Rusio** kaj **Ukrainio**.

La jaron 2024 ni finis per la festo de 100 jaroj de la kroata poetino **Zora Heide**, okazinta en la zagreba maljunula hejmo, kie ŝi nun vivas. La lasta programo en 2024 estis dediĉita al Zamenhof-tago kun la serbaj gastoj **Zlatoje Martinov** kaj **Saša Pilipović**, kiuj per prelego kaj kantoj helpis omaĝi al grandaj esperantaj poetoj **Marjorie Boulton** kaj **William Auld** kaj la samjare naskita **Zora Heide**.

Aparta Zamenhof-jara festo okazis en Ĝurdevac ĉe Dokumenta Esperanto-Centro.

Nia lasta programo en 2024 estis la festo de Kroata Fervojista Esperanto-Asocio, kiu omaĝis al sia 70jara jubileo post la fondiĝo.

En oktobro vizitis nin **Nikola Rašić** kaj prelegis pri la deveno de la vorto **Rom**.

Josip Pleadin prezentis en novembro sian pretecon transpreni la tutan arkivon de Kroata Esperanto-Ligo kaj transporti ĝin al Ĝurdevac. Kroata ŝtata arkivejo donis la konsilon ne porti nian Esperantan arkivon al Ĝurdevac sed preferis mem protekti ĝin en la eleganta domo en Marulićev trg.

La tempo tiom rapidas ke jam foras la januara prelego en Esperanto-Societo "Tibor Sekelj" de nia membo **Olga Štajdohar-Paden**. Ŝia prelego de la 15a de januaro temis pri "Virinoj kaj viroj – Faktoj kaj mitoj". Olga klopodas plividebligi la virinojn en nia mondo.

Okaze de la Nokto de la muzeo en **Kroatio**, la 31an de januaro, Kroata Esperanto-Ligo malfermis la pordojn de siaj ejoj al vizitantoj. Aperis sesdeko da homoj. Kun intereso ili rigardis la malnovajn dokumentojn kaj lernilojn el la komenco de la 20-a jardeko, foliumis tradukojn de la kroata literaturo al multaj lingvoj.

Pri la riĉa historio de Esperanto en **Kroatio** parolis **Spomenka Štimec**. La enkondukan lecionon pri Esperanto de **Đivo Pulitika** ĉeestis dudeko da civitanoj.

En februaro la 20an kaj la 21an, niaj membroj **Ankica Jagnjić** kaj **Josip Pleadin** partoprenis en **Sarajevo** la Rondon tablon "Lingvo kaj artefarita intelekto", organizita de la najbarlanda Esperanto-Ligo de **Bosnio kaj Hercegovino** sub gvido de **Edin Čolić**. La eventon malfermis la federacia ministrino pri klerigado kaj scienco prof. **Jasna Duraković**.

La 13a kongreso de kroataj esperantistoj okazis en **Slavonski Brod** inter la 16a kaj la 18a de majo 2025. La organizanto estas Dokumenta Esperanto-Centro el Ĝurdevac. La 16an de majo okazis jarkunveno de Kroata Esperanto-Ligo. Libroprezentado okazis en Domo Brlić kaj kun ĝojo ni salutas la aperon de plia verko de **Ivana Brlić Mažuranić** tradukita en Esperanton. Temas pri "Jaša la Dalmato, la vicreĝo de Guĝerato". La dimanĉa ekskuro gvidis al Natur-parko **Jankovac**.

Kun plezuro en Zagrebo en la societo "Tibor Sekelj" ni gastigis **Petran Heisinger** la 12an de februaro kaj ŝian libron "Mi estas Petra, vi ne rompos min" kaj la novan libron de nia membro **Faruk Islamović** pri la rivero **Jadova**, "la belulino de Lika" en marto.

La dua adriatika feriado en **Prvić Luka** okazos sub la gvido de **Josip Pleadin** en la tiea ripozejo **Požega** de la 21a ĝis la 28a de junio. Sua Adriatika somerumado. En ĝi partoprenos 20 esperantistoj.

La denaska Esperanto-parolantino **Tina Tišljar**, kunposedantino de la produktora firmao "Eclectica" gajnis per sia lasta filmo "Festo" reĝisorata de **Bruno Anuković**, laŭ la libro de **Damir Karakaš** post prezento en **Karlovy Vary** en Ĉeĥio gajnis la oran premio ĉe la festival en **Pula** en 2024 kaj estis vaste prezentita en 2025.

En somera semestro ĉe Filozofia

fakultato daŭre funkcias elektelebla kurso Planlingvoj por studentoj en la bakalaŭra stuprogramo de germanaj studoj ĉe prof. **Velimir Piškorec**.

El **Split** atingis nin broŝuro "Esperanto – jezik za sve" / "Esperanto – la lingvo por ĉiu". Infomoj pri Esperanto en la kroata lingvo prepares **Darija Budiša**, **Lidija Leskur** kaj **Ivan Perković**. Uzitaj estis ankaŭ aforismoj de **Dinko Matković**. Grafika aranĝo de **Ivan Špoljarec**.

Nova membro **Višnja Katalinić** kandidatis ĉe Aŭstra Esperanto-Kongreso kaj ŝia prelego pri la aŭstra verkisto **Clemens Johann Setz** kaj lia verko "La abeloj kaj la nevideblo" kun **Kroatio** en la fokuso, eniris la programon por la 9a de majo 2025 en **Graz**. **Višnja** pozas ĉi-numere en la "kroata Esperanta ĉemizo" ĉe la enirejo al Eŭropa Parlamento en



Strasburgo. La ĉemizon k i e s de seĝon, a l u d a n t e la kroatan blazonon, ĉi foje en la verdaj koloroj, kreis **Mihaela Cik**.

Ankaŭ **KEL**-membro **Filip Ivančić** partoprenis en la kongreso en **Graz** kaj raportas al ni plie. Nia membrino **Ankica Jagnjić** kaj la serba aktoro **Saša Pilipović** ŝatus prepari por la 110a Universala Kongreso de Esperanto, okazonta en **Brno** en Ĉeĥio de la 26a de julio ĝis la 2a de aŭgusto teatraĵon "Stilekzercoj" de la franca aŭtoro **R. Qeaneau**. Por esperantaj kondiĉoj adaptis la verkon **Zlatko Tišljar - Pajo**. Sed la organizantoj preferas prezenti al la publiko ĉeĥajn aŭtorojn.

Bonan legadon de Tempo!

S. Štimec

Fondita en 1980. Ne aperis en la militaj jaroj 1993 kaj 1994. Ĝis la jaro 2017 aperis papere kaj voĉe sur kompaktdiskoj. Jaro XLVI (46), numero 145 (1/2025) ISN 2991-194X. Sona numero 63/2025.

Tempo aperas sone sur kompaktdisko ĉe Kroata Unuiĝo de Nevidantaj Esperantistoj en Zagrebo ekde 2004 kaj en 2022, 2023 kaj 2024 ĉe la Biblioteko por blindaj kaj malbonvidantaj personoj en Zagreb. Voĉlegas Spomenka Štimec.

La reta versio de Tempo ĉe: www.esperanto.hr/tempo_kel.htm

Tempo estas eldonita per la financa subteno de Ministerio pri kulturo kaj amaskomunikiloj.

Redakcio / Uredništvo; Eldonisto / Nakladnik: Hrvatski savez za esperanto / Kroata Esperanto-Ligo, Vodnikova 9, HR10000 Zagreb, Kroatio, +385 (91) 4617550; kel@esperanto.hr, www.esperanto.hr; IBAN HR6124840081100881157; OIB 53992829935

Kontribuis: Ana Alebić-Juretić, Mladen Belicza, Juraj Bubalo, Edin Čolić, Petra Heisinger, Zlatko Hinšt, Nevenka Imbert, Faruk Islamović, Filip Ivančić, Višnja Katalinić, Luka Kik, Alessandra Madella, Damir Malkoč, Eric Nsambiyumva, Željko Saks, Shuleka Pollak, Heinz-Wilhelm Sprick, Ivan Špoljarec, Spomenka Štimec, Dubravko Toplak, Mario Vetrh, Wu ZhaoYang, Darko Žubrinic

Redaktoris: Spomenka Štimec. **Grafika aranĝo:** Ivan Špoljarec. La redakcio ne respondecas pri la opinioj de la subskribitaj artikoloj.

Sur la titolpaĝo: Partoprenantoj de la 13a kongreso de kroataj esperantistoj, Slavonski Brod. Fotis: Željko Saks

La 13-a kongreso de kroataj esperantistoj

La 13-a kongreso de kroataj esperantistoj okazis en Slavonski Brod

De la 16a ĝis la 18a de majo 2025 kroataj esperantistoj renkontiĝis en Slavonski Brod por sia 13a kongreso. La organizanto kiel lastjare estis Dokumenta Esperanto-Centro. Sesdeko da kroataj kongresanoj veturis al Slavonski Brod. En la bela subtegmenta kongresejo Domo Brlić kun la kroatoj kongresis ankaŭ tri hungaroj kaj unu sloveno.

La kongresanoj loĝis en simpatia hostelo Mali Pariz, kie enkonduke al la kongresaj programoj okazis la jarkunveno de la Asembleo de Kroata Esperanto-Ligo. En la lasta kunsido de tiu ĉi mandato ĉeestis 17 asembleanoj, kiuj traktis siajn movadajn problemojn.

En la fokuso de la kongreso en Slavonski Brod estis Vilim Buk, la presisto-esperantisto en kies presejo estis dum la unua jardeko presita la plej fama sudeŭropa Esperanto-Revuo "La Suda Stelo", kiu estis legita ankaŭ internacie de la jaroj 1932 ĝis 1973. Esperantistoj portis florkronon al lia tombo kaj Josip Pleadin prelegis pri la interesa vivo de la persono sen kiun ni ne havus valoran revuon. Vilim Buk ricevis sian memortabulon en Slavonski Brod. Ĝi estis muntita sur la domo sur kies loko iam staris la presejo de Buk. Tiel Kroatio ricevis plian ZEON.

Ni kongresis en la renovigita subtegmentejo de la domo Brlić en kiu dommastris la fama kroata verkistino Ivana Brlić Mažuranić, kiel edzino de la advokato Vatroslav Brlić. Ni havis okazon viziti ŝian loĝejon.

Okaze de la kongreso Zdravko Seleš nome de la eldonisto Dokumenta Esperanto-Centro prezentis la novan eldonaĵon de Ivana Brlić Mažuranić kaj ŝian lastan libron *Jaša Dalmatin, vicreĝo de Guĝerato*, tradukita de Josip Pleadin. Fragmenton el la verko legis Ivanka Seleš.

Fakte, kiam la konata kroata esperantistino Lucija Borčić jam kuŝis malsana en maljunula hejmo, Spomenka Štimec vizite donacis al ŝi, la dalmata sinjorino, tiun lastan pridalmatan verkon de Ivana Brlić Mažuranić. Zagreba esperantistino Marija Belošević vizitis Lucijan kaj tajpis la manuskriptajn paĝojn de la traduko. Unu ĉapitron Marija Belošević cedis al Tempo, kiu publikigis

Jarkunveno de la Asembleo de KEL



Familianoj de Vilim Buk kun esperantistoj

la tradukon de Lucija dum ŝia vivo. Nun Marija Belošević ne volis disponigi la manuskripton por ke DEC kreu libron kaj omaĝu al Lucija. Josip Pleadin sidiĝis kaj retradukis la verkon por la Kongresa eldono.

Plia libro de Luce Cetinić, la dulingva *Elkore verkita* estis prezentita de siaj samklubanoj el la urbo Split, Darija Budiša kaj Lidija Leskur.

Dimanĉon la ekskurso gvidis al la bela Naturparko Papuk kun tagmanĝo en la montara domo Jankovac.

S. Štimec

Fotoj: Željko Saks

La omaĝa memortabulo al Vilim Buk



Esperantistoj ĉe la tombo de Vilim Buk



FESTO DE LA 100-a JARIĜO DE LA FONDO DE KLUBO DE ESPERANTISTAJ FERVOJISTOJ (KEF) EN ZAGREB

La 30-an de Aprilo 1925 estis fondita Klubo de esperantistaj fervojistoj (KEF) en Zagreb. Tiu estis la unua fervojista esperanta societo en Zagreb kaj en Kroatio. Ĝi estis la antaŭulo de Fervojista Esperanto-Societo (FES) Zagreb kaj Kroata Fervojista Esperanto-Asocio (KFEA). La festo de la 100-a jariĝo ĉi-tiu Klubo okazis mardon la 29-an de Aprilo 2025 komence je 17 horo, kun renkontiĝo ĉe la adreso Ilica 48. En tiu adreso la Klubo tiam agadis. Ĉe la tramhaltejo okazis parto de la programo. Poste tio nia programo daŭris en Bierejo „Medvedgrad“. Prelegis d-ro Zlatko Hinšt pri la jubileo kaj historio de fervojista esperanta movado. Ni memoris pri meritoplenaj esperantistoj kiuj naskiĝis en la jaro 2025. Elstarigitaj estis funkciuloj en Klubo de fervojistaj esperantistoj Zagreb kaj membroj de kluba komitato, prezidanto Ivan Poženel, vicprezidanto Ivan Novak, sekretario Milan Zupančić, kasisto Edigije Gomišček, en Komitato Ilija Puhalo, Ivan Štahan kaj Josip Hanž, kaj revizoroj estis Vilibald Vičević, Franjo Trupković kaj Josip Pahoki. La klubanoj kunvenis ĉiu-ĵaŭde en la ejo kiu troviĝas ĉe Asocio de jugoslavaj naciaj fervojistoj en Ilica 48/II etaĝo. Josip Zupanić poste aliĝis en Klubo kaj li fariĝis unu el asesoroj (delegitoj) en delegacio de esperantistoj-fervojistoj de Jugoslavio en Internacia Asocio de Esperantistaj Fervojistoj (IAEF). Oni parolas pri ilia agado ĝis fondiĝo de alia societo – Fervoja Esperanto-Societo



La domo en kiu agadis KEF. Zagreb, strato Ilica 48/II.
Fotis Z. Hinšt

Zagreb en la jaro 1954. Elstarigita estis ankaŭ unua esperantisto-fervojisto en Kroatio kaj Jugoslavio, Teodor Kovács kiu en la jaro 1902 enloĝiĝis el Hungario en Rijeka kaj fariĝis membro de Adriatika Ligo Esperantista (ALE) en la jaro 1907, la unua esperanta organizo en Kroatio.

Ni memoris ankaŭ la centjariĝon de la naskiĝo de **Ana Medić** (1925-2022), kiu loĝis en la najbara domo en Ilica 50 kaj kiu estis dum multaj jaroj fidela membro de nia asocio.

Zlatko Hinšt

Arkivo de KEL

La institucio Kroata Ŝtata Arkivo esprimis sian pretecon akcepti la arkivaĵon de Kroata Esperanto-Ligo, konservi kaj prezenti ĝin en diĝita formato kiel aliajn gravajn dokumentojn pri kiuj ĝi zorgas.

Kroatio havas privatan institucion, la asocion, kiu modele okupiĝas pri arkivado gvidata de kompetenta arkivisto kaj konanto de historiaj movadaj cirkonstancoj Josip Pleadin el Đurđevac. La estraro de KEL decidis obei la leĝon kaj transdoni siajn dokumentojn al Kroata ŝtata arkivo.

Kio estas la plej malnova Esperanto-dokumento en la arkivo de KEL? Tio estas la kopio de la unua esperanta gazeto "La Esperantisto" kiu aperis en Nurnbergo en la jaro 1889. Ĝi estas kopio nur, do neinteresa por Kroata Ŝtata Arkivejo, kiu kolektas kaj gardas nur originalaĵojn.

La 14an de majo en Esperanto-Societo "Tibor Sekelj" Spomenka Štimec prezentis la arkivon gardata de Kroata Esperanto-Ligo. Dum la prelego estis prezentitaj artefaktoj el la epoko de 1909 ĝis

1950, ekzemple la vortaro verkita de la pionirino Danica Bedeković Pobjenička, kiu estis posedita de la pioniro Mavro Špicer. Špicer en la vortaron mane enskribis ŝanĝojn kiujn li volis uzi por sia vortaro Esperanto-Kroata.

Estis interese vidi la lernilojn pri Esperanto kiujn posedis Paul Kastner, la posedanto de la vardomo "Nama" kiam ĝi nomiĝis Kastner und Ohler.

Kelkaj helpantoj anonciĝis por prepari la artefaktojn por la transdono. Sur la foto du bibliotekistinoj Darinka Sović kaj Lucija Gabrić listigas la dokumentojn kaj librojn.

S.Š.



Fotis Višnja Katalinić

La prelego en Graz

Kroata prelego ĉe Aŭstria Esperanto-Kongreso en Graz



Inter la 9-a kaj 11-a de majo en Graz okazis Aŭstria Esperanto-Kongreso, kiu kolektis ĉirkaŭ kvardek partoprenantojn el pluraj eŭropaj landoj kaj el Pakistano. **Kroataj** partoprenantoj estis **Viŝnja Katalinić**, **Filip Ivančić** kaj **Neven Kovačić**. La kongreso komenciĝis vendrede, la 9-an de majo per salutvortoj de la urbestro de **Graz Elke Kahr** kaj de turisma estro de la urbo **Dieter Hardt-Stremayr**. La prezidanto de Esperanto-Societo Stirio **Ewald Schick** bonvenigis ĉiujn partoprenantojn.

Post la solena malfermo de la kongreso sekvis prelegoj de eminentaj reprezentantoj de Esperantujo el **Aŭstrio** kaj el **Eŭropo**. Dum la unua kongresa tago la partoprenantojn povis aŭskulti interesajn prelegojn pri serĉado de pli profunda senco en la vivo el perspektivo de psikoanalitiko, pri kulturaj diferencoj inter **Eŭropo** kaj **Azio**, pri rilatoj inter Unuiĝintaj Nacioj kaj UEA, kaj fine pri gravaj sciencistoj, kiuj vivis kaj laboris en **Graz**. La vendredan kaj la sabatan horaron markis Interkona Vespero kaj buntaj muzikprogramoj. Vendrede vespere estis prezentita ĉeĥa muzikgrupo Šafrda,

kiu kantas en Esperanto.

La dua tago de la kongreso komenciĝis pri ekzercoj de ĉigongo. Poste sekvis prelegoj pri diversaj temoj. La zagreba bibliotekistino **Viŝnja Katalinić** prelegis pri la fama aŭstra verkisto naskita en Graz en 1982, **Clemens Johann Setz** kaj la kroata ĉapitro de lia romano „La abeloj kaj la nevidebla“.

La sabatan muzikan programon markis la koncerto de slovena kantisto **Gregor Markič**.

Dimanĉon matene la kongresanoj havis la eblecon ĉeesti la Sanktan Meson en Esperanto en preĝejo Sankta Triunuo en strato Karlau. La meso estis dediĉita al la beatproklamo de katolika esperantisto **Max Joseph Metzger**, kiu vivis kaj agis en **Graz** dum jaroj. La programo poste daŭrigis per la dua serio de ekzercoj de ĉigongo kaj prelegoj. Kroataj partoprenantoj revenis hejmen al **Zagrebo** plenaj da novaj pozitivaj impresoj kaj ekligitaj amikecoj.

Filip Ivančić

Fotis: Viŝnja Katalinić

Neven Kovačić, Filip Ivančić, Viŝnja Katalinić



Juraj Bubalo “De Polo ĝis Malnar”



De Marko Polo ĝis Željko Malnar

Vojaĝantoj kaj esploristoj en la kroata kulturo de la 13a ĝis la 20a jarcento

Esperanto-Societo “Tibor Sekelj” en Zagrebo gastigis la 8an de aprilo **Juraj Bubalo**, la aŭtoron de la libro *De Marko Polo ĝis Željko Malnar*. **Bubalo** estas profesoro pri filozofio kaj sociologio, sed lia pasio estas esploroj kaj vojaĝoj. Li nomas sin “sekeljisto” ĉar li havas apartan intereson por la esploroj de **Tibor Sekelj**. Li prezentis al ni sian lastan libron, en kiu en aparta ĉapitro akompanata de multaj dokumentoj rolas ankaŭ **Tibor Sekelj**. **Bubalo** aŭtoris la jenajn librojn *Put Indije*, *Sto dana Azije*, *Braća Seljan*, *Dodir Orijenta*.

Ni multe ĝuis en liaj prezento de la lasta libro kaj liaj konoj pri **Tibor Sekelj**. Ni ankaŭ montris al li la malnovan Esperanto - kroatan vortaron de lia samnomo esperantisto **Niko Bubalo**, publikigita en **Zagrebo** en 1923.

Juraj Bubalo mem lernetis Esperanton por siaj esploroj kaj povas orientiĝi en ĝi.

S. Š.

FINIĜIS LA STUDOJ DE INTERLINGVISTIKO EN POZNANO

Dum la semajno de la 08 ĝis la 18a de septembro 2024 okazis en Poznano tri gravaj kaj grandaj okazaĵoj: la finaj ekzamenoj de la lasta generacio de la Interlingvistikaj Studoj ĉe la Universitato Adam Mickiewicz, la 38-a eldono de Arkones, kaj la plej grava: la 21a Internacia Kongreso de Lingvistoj ICL2024.

La finaj ekzamenoj de la lasta generacio de postdiplomaj Interlingvistikaj studoj kaj instruista trejnado okazis de la 9a de septembro, ĝis la 12a de septembro 2024. Tio estis la lasta, oka grupo kiu finis la studojn en Poznano, ĉe la Adam Mickiewicz Universitato. La grupo komenciĝis kun 41 studentoj el 21 landoj. Pro la pandemio, la instruado komenciĝis en hibrida formo: unu semajno dum la jaro en **Poznano**, kaj aliaj sesioj per Zoom. Dek unu studentoj el 7 landoj (Ĉinio, Brazilo, Britujo, Koreio, Pollando, Ĉeĥio kaj Kroatio) finis siajn studojn per prezentado de diplomlaboraĵoj. La temoj de diplomiĝaj laboroj estis la jenaj: pri tradukado: Vitor Monteiro (BR), GONG Xiaofeng kaj YU Jianchao (CN) kaj O Gisook (KR), esperanta movado: Trim Owen (GB), Fabio Fortes (BR), metodiko: Maurizio Giacometto (GB), Rafal Darasz (PL), Milan Kolka (CZ), kaj interlingvistiko: Renato Filho (BR) kaj Ana Alebić-Juretić (HR). Samtempe, en la



La lasta generacio de studentoj de Interlingvistikaj studoj en Poznano kun gvidanto Ilona Koutny kaj Katalin Kovats, instruisto kaj teknika majstro de la studoj. Fotis A. Alebić-Juretić

unuajara instruista trejnado finis la sesion kvin studentoj el Ĉinio, Serbio kaj Francio/Nederlando kaj Pollando.

Bedaŭrinde, post 26 jaroj la Interlingvistikaj studoj ĉe la Universitato Adam Mickiewicz en Poznano fermiĝas. La fermo de Interlingvistikaj studoj estas la fino de erao en Esperantujo, kaj mi povas nur esperi ke la studoj ie daŭros ie aliloke. Dankegon al **Ilona Koutny**, gvidanto, kaj **Katalin Kováts**, ne nur teknika helpo por realigo de tiuj studoj.



La Interlingvistikan sesion sekvis la 38-a eldono de ARKONES, festivalo de esperanta kulturo en **Pollando**, kiu okazis de la 13a ĝis la 15a de septembro 2024. Tiu festivalo estis ligita al la Interlingvistikaj studoj, ĉar multaj studentoj kaj instruistoj partoprenis en la programo. Krom la prelegoj, ARKONES havis plurajn laborsesiojn kaj muzikajn programojn. En ĉi tiu jaro al kunveno aliĝis du gravaj estraranoj Duncan Charters, prezidanto de UEA kaj François Lo Jacomo, sekretario de la Akademio de Esperanto, kiuj prezentis la nunan statuson de Esperanto kaj planon por prepari novan rezolucion pri Esperanto ĉe UNESCO. Inter aliaj, **Ilona Koutny** parolis pri la Interlingvistika laborgrupo ĉe la Internacia Kongreso de Lingvistoj 2024 kaj pri la 100-jara jubileo de **István Szerdahelyi** (fondinto la Budapeŝta Esperanto-fako). En programo partoprenis prelegantoj de la Studoj (Katalin Kováts, Michael Farris kaj Nikolau Dols), finstudintoj de la Interlingvistikaj studoj (GONG Xiaofeng, Milan Kolka, Hoan Thi Tran, Vitor Monteiro) kaj ZHANG Changsheng, partoprenanto de la Instruista trejnado. Bedaŭrinde, tio estis la lasta eldono de Arkones.

Dum la tuta semajno okazis la 21a Internacia Kongreso de Lingvistoj ICL2024 ĉe la sama Universitato Adam Mickiewicz. Unu laborsekcio de la kongreso estis dediĉita al Interlingvistiko. Interlingvistiko havas historian radikon en Internaciaj Kongresoj de Lingvistoj, jam el la dua kongreso en Ĝenevo en 1931, kiam lau la propono de Otto Jaspersen ili traktis la problemon de internaciaj lingvoj. Gvidantoj de la sekcio estis **Ilona Koutny** kaj **Nikolau Dols**, kaj la sekcio enhavis 12 prelegojn el 11 landoj. La laborsekcion salutis **Duncan Charters** (USA), prezidanto de UEA kaj **François Lo Jacomo** (FR), sekretario de Akademio de Esperanto. Post la enkonduko de Ilona

Koutny, profesoroj de la Internaciaj studoj **Nikolau Dols** (ES) parolis pri konverĝaj kaj diverĝaj tendencoj en Esperanto surbaze de la tekstaro, **Christopher Gledhill** (GB/FR) prezentis problemojn de paronimoj kaze de terminoj kaj **Philippe Planchon** (FR) diskutis la uzon de -ig kaj -iĝ lige kun la verbaj valentoj. Ilona Koutny (HU/PL) prezentis István Szerdahelyi (fondinto de la Esperanto fako en Budapeŝto) okaze de lia 100 jara jubileo, **Verā Barandovská-Frank** (CZ/DE) elstarigis la rolon de la latina kaj latinidaj lingvoj en lingvoplanado. Studento **Fabio Fortes** (BR) esploris kiomgrade la bazaj nocioj de esperantistoj estas akceptataj inter neesperantistaj studentoj en **Brazilo**.

En aliaj sekcioj de ICL2024 partoprenis d-ino **Ida Stria** (PL) en lingvopolitika sekcio, kaj studentoj **Ralf Darasz** (PL) en signolingva sekcio kaj **Ana Alebić-Juretić** (HR) en la sekcio pri historia lingvistiko. **Ana Alebić-Juretić** prezentis sian diplomlaboron pri la fontoj de la Fiuma idiomo, pruvante ke Esperanto kaj Interlingvistikaj studoj povus esti uzataj en lingvistikaj esploroj.



*Partoprenantoj de la Interlingvistika laborsekcio de la 21a Internacia Kongreso de Lingvistoj en Poznań.
Fotis: A. Alebić-Juretić*

Partopreno en ICL2024 estis la pinto de Interlingvistaj studoj, pruvante valorojn de iliaj profesoroj kaj studentoj. Granda finalo – sed fino.

Ana Alebić-Juretić

Fontoj:

- Interlingvistikaj studoj: https://interl.home.amu.edu.pl/interlingvistiko/raporto_sep21en.html (27.09.2024.); <https://edukado.net/novajhoj?id=910>

- Ilona Koutny: Raporto pri Interlingvistika sekcio dum la 21-a International Congress of Linguists (ICL) en Poznań (PL), 12-13.09.2024, <https://edukado.net/novajhoj?id=911>

- Arkones: <https://www.arkones.org/partopreno/programo-de-arkones/> (27.09.2024)

Kio nova pri azilpetado?

Nia amiko Eric el Burundo ricevas plurajn demandojn: ĉu li daŭre restas en Kroatio? Ĉu sukcesis la azilpetado.

Jen liaj respondoj:

Estas nun dudek naŭ monatoj ke mi loĝas en **Kroatio** kaj klopodas integriĝi kaj adaptiĝi. Dum tiu tempo mi vivas kiel eterna lernanto en pluraj fakoj de la vivo. Mi akiris konsiderindan sperton de la vivo, plivastigis mian komprenkapablon de la ekstera mondo.

Mia restado en **Kroatio** estas tre fruktodona kaj; verŝajne pere de ĝi, mi atingis iun punkton en mia vivo kiun iame mi konsideris neatingeblan en mia imago, mia sonĝo fariĝis realeco kaj dankegas Dion pro tio.

Tiam, kio estis por mi neatingebla?

Mi neniam antaŭe povis imagi ke okazus tia momento por mi ke mi vivos en la lando de blankuloj... vivi inter ili, kunlabori kun ili, kompleteti kun ili, amikiĝi... mi sincere estas tre ege danka.

Karaj, por mi **Kroatio** estas mia dua hejmolando kaj ĉio estas disponebla kvazaŭ mi naskiĝis ĉi tie:

mi havas tegmenton super mia kapo, esperantistoj kaj eklezianoj estas miaj familianoj, amikoj abunde helpadas min, mi hava laboron mi eĉ progresas pri la lernado de la kroata...

Unu el miaj tri gementoroj ĉiam konstatas kiam mi perdas esperon kaj altiras malpozitivajn sentojn kiuj oftege metas min eksteren de tiu preskribita mondo. Ŝi diris al mi freŝdate: "Vi devas kompreni ke se vi ne kreskas, vi malkreskas." Ŝi konstatis ke mi ekperdiĝis mense, malkuraĝiĝis kiam ni babiladis dum matenkafumado, ŝi tion konstatis kaj forte konsilis min ŝanĝeti vivostilon por ebligi al naturo helpi min.

Sincere, mi estis spirite malplena kaj ŝajnis diskonektita.

Laste pri mi: mi pluatendas la respondon de la tribunalo por konfirmi aŭ malkonfirmi mian azilpeton en Kroatio. Ĉar mia peto estis rifuzita, mi devis engaĝi advokaton, specialiston pri azilpetado. Li nun zorgas pri mia „kazo“.

Necesas atendi. Ĝis tiam mi daŭrigas mian pormomentan vivon kaj aventurojn kaj dankas al ĉiuj pro la helpo. Laste en aprilo mi partoprenis en literatura programo sur **Sljeme**, kiu traktis la temon „De Afriko ĝis Sljeme“.

Eric Nsabiyumva

Tempo studi Esperanton en Zaozhuang-a Universitato

Kiel studento de la Esperanto-fako ĉe Zaozhuang-a Universitato, mia studvivo estas plena de defioj kaj amuzo. Lerni Esperanton ne nur montris al mi novan lingvosistemon kaj plilarĝigis miajn horizontojn, sed ankaŭ permesis al mi konatiĝi kun multaj samideanoj. Povi renkonti interesajn homojn el la tuta mondo estas certe granda avantaĝo de la internacia lingvo.

En niaj lecionoj ni lernas la gramatikon kaj la prononcon de Esperanto, klopodante pligrandigi nian vortprovizon. Samtempe la instruistoj rakontas al ni pri la historio de Esperanto, kio multe fascinas nin. Tamen, por ĉina studento iĝi scipova en Esperanto postulas multe da praktiko kaj legado. Ni ofte faras parolajn ekzercojn, simulante realajn komunikajn scenarojn por plibonigi niajn esprimkapablojn. Ni ankaŭ regule partoprenas en universitataj konkursoj pri verkado de eseoj, teatro-ludado kaj oratoraj alparoloj por montri al la studentoj de la aliaj fakoj niajn rezultojn kaj plialtigi nian memfidon. Krome, ni legas Esperantajn literaturajn verkojn por kompreni la kulturon de Esperanto kaj multajn aliajn kulturojn pere de ĝi. Ekzemple, mi scias, ke en nia Esperanto-Muzeo troviĝas diverslingvaj tradukoj de la kroata klasikaĵo *La mirindaj aventuroj de metilernanto Hlapić*, donacitajn de la fama kroata verkistino Spomenka Štimec. Sen Esperanto mi verŝajne neniam havus la ŝancon legi tiun verkon, kio estus granda domaĝo.

Krom klasĉambra studado, mi aktive partoprenas en diversaj Esperanto-agadoj. Ekzemple, mi iris al Japanio por ĉeesti la 110-an Japanan Kongreson kaj al Sud-Koreio por partopreni en la 3-a Komuna Kongreso de Japanio kaj Koreio. Komunikis kun samideanoj el diversaj landoj kaj regionoj permesis al mi kompreni iliajn kulturajn tradiciojn. Por mi tiuj vojaĝoj estis ne nur ŝanco ĉeesti gravajn internaciajn eventojn, sed ankaŭ sperti la pejzaĝon kaj la socian medion de diversaj landoj. Ili plibonigis miajn lingvajn kapablojn kaj permesis al mi trovi multajn interesajn amikojn. Ĉiu samideano, kiun mi renkontis, traktas Esperanton kun speciala zorgo kaj sentas sin kiel heredanto de grava internacia kulturo. Ili ne plu rigardas Esperanton kiel ordinaran lingvon,



Nanjing parko. Fotis Ivan Špoljarec

sed kiel amikon, kiu delonge akompanas ilin. Mi estas dankema al nia lingvo kiel ili.

Ĉar ni vojaĝas nome de Zaozhuang-Universitato, ni havas la taskon prezenti al la kongresaj partoprenantoj niajn Esperanto-produktojn, niajn planitajn kursojn por internaciaj studentoj kaj la riĉajn enhavojn de nia Esperanto-Muzeo. Mi multe ŝatas viziti la muzeon dum mia libera tempo. Kvazaŭ ĉiuj objektoj havus animon, ili rakontas sian historion kaj revenigas min al siaj epokoj de luktoj kaj esperoj. Foje mi bonvenigas en la Muzeo vizitantojn el aliaj landoj. Vidi tiujn samideanojn tiel scivolemaj, inspiras min pli multe lerni Esperanton kaj pli multe esplori pri ĝia grava rolo en azia historio.

Mi verdire renkontis kelkajn malfacilaĵojn en la lernado de Esperanto. Informoj pri ĝi estas malfacile troveblaj kaj ni devas elspezi pli da tempo kaj energio por serĉi lernmaterialojn. Kaj estas malfacile apliki al la reala vivo la sciojn, kiujn ni lernis, ekster la limigita tempo de internaciaj kongresoj. Por venki tiujn malfacilaĵojn, ni aktive serĉas internaciajn korespondantojn kaj lernopartnerojn. Helpe de niaj instruistoj kaj de interreto, ni kuraĝigas unu la alian por kune progresi.

Esperanto ne nur permesis al mi regi novan lingvon, sed ankaŭ instruis al mi kiel alfronti defiojn, kultivante mian paciencon kaj persistemon. Mi certe daŭre laboros por lerni Esperanton kaj klopodos doni mian kontribuon por antaŭenigi interkompreniĝon kaj pacon inter homoj.

Wu Zhaoyang
Sunlumo

Per Esperanto al Hinda Unio

Kroata-Hindia Societo prezidata de **Joginder Singh Nijjar**, premiita de la prezidento de **Hinda Unio** en 2023, gastigis la 28an de aprilo je la 18a horo **Spomenka Štimec**, kiu prelegis pri la rilatoj de kroataj esperantistoj kun **Hinda Unio**. Tio estos la okazo por prezenti ankaŭ la librojn originale verkita en Esperanto, ekz. de **Edmond Privat** “La vivo de Gandhi”, eldonita en Esperanto ĉe la eldonejo La Stafeto en **La Laguna de Tenerife**, samkiel la ĉapitron pri la kunlaboro de **Tibor Sekelj** kun **Aĉarjo Vinoba Bhavé** el lia libro “La Mondo de travivaĵoj”.

En la fokuso estos la kunlaboro kun la bengala profesoro **Probal Daŝgupta** en la tradukado de “Mirindaj aventuroj de metilernanto Hlapiĉ” en la bengala kaj en la EU- projekto **Hinda Unio** - la partnero de EU el 2008 per kiu 3 eŭropaj aŭtoroj estis tradukitaj al la bengala per Esperanto kaj la bengala aŭtoro **Trailokanth Mukhopadaj** al la slovena, kroata kaj itala lingvoj. Tiel la verko de **Joža Horvat** “Wa I Tapu” atingis la bengalan legantaron. Ne mankis ankaŭ informoj pri la prezento de ombropupteatro el **Madras** kun la rakonto “Ramayana”.

La prelegon organizis prof. **Darko Žubričić**.

S. Štimec



S. Štimec prelegas. Fotis Darko Žubričić



Slovenaj kaj kroataj esperantistoj ĉe la Tagoj de la libro en Maribor



Fotis Mario Vetrih

La 30an de majo 2025 kadre de la Tagoj de la libro en **Maribor** gastis en **Literarna hiŝa Spomenka Štimec** kun du pliaj du kroataj prelegantoj **Ivica Glogoški** kaj **Božidar Brezinščak Bagola** en la programo “Najbareco kaj pli”. **Glogoški** prezentis siajn tradukojn de slovena aŭtoro **Branko Sömen** kroaten kaj **Bagola** prezentis siajn tradukojn de abstrahita sed slovenevena poeto **Alois Hergout**.

Štimec rakontis pri komunaj radikoj de Esperanto por slovenoj kaj kroatoj, kiuj ambaŭ startis en **Osijek** en la jaro 1889, kiel eblas legi en la esploroj de **Davor Klobučar**: tiujare kvin knabinoj el **Osijek** sendis konfirman poŝtkarton al **Lazaro Ludoviko Zamenhof** en **Varsovio** (tiam troviĝanta en **Rusio**), ke ili komencis lerni Esperanton. La samon faris certa sinjoro **Egon Mosche**, kiu tiujare soldatservis en **Osijek** kaj kiu poste montriĝos la unua slovena esperantisto kaj la unua slovena milita ĵurnalisto reportinta pri la militaj eventoj en Sud-Afriko! (Ĉiuj komencantaj esperantistoj eniris la unuan adresaron de **Zamenhof**.) En **Sud-Afriko** la sloveno batalis je la flanko de burojoj kaj estis dum la bataloj kaptita flanke de la anglaj soldatoj. Lia patro, slovena advokato liberigis lin post komplika intertraktado kun la britaj instancoj. La patro cetere junaĝe amikis kun la kroata verkisto **August Šenoa** kaj piede vizitis **Slovenion**, kio inspiris **Šenoa** por la fama verko *La dianto de sur la poeto tombo*. En la verko **Šenoa** nomas sian amikon simple A.

Cetere la personeco de **Egon Mosche** inspiris lian soldatan kolegon kaj postan aŭstran verkiston **Roda Roda** (naskita en **Osijek**) verki pri **Mosche**.

La domo de la fratino de **Egon Mosche**, **Vera Valenta-Mosche** en **Slovenio** ĉe la Lago de **Bled** estis konfiskita en 1945 kaj ŝia familio devigita al elmigrado. Tiu vilao ĉe la **Lago de Bled** hodiaŭ portas la nomon de la granda slovena poeto **France Prešern**.

Post la siatempa prelego de **Davor Klobučar** en **Literarna hiŝa**, la direktoro **Marijan Pungartnik** turnis sin al la urbestro de **Bled** kaj atentigis la urbestron pri la fakto ke la konfiskita domo portas la nomon de **Prešern**, kion la granda poeto certe ne aprobus. La urbestro anoncis ke li entreprenos ion por ŝanĝi tiun fakton.

Ĝis 2025 okazis nenia ŝanĝo.

Štimec prelegis pri la traduko de la slovena verkisto **Tone Partljič** per Esperanto al la bengala, kadre de la EU projekto pri infanlibroj en 2008. La aŭtoro **Tone Partljič** mem ĉeestis la eventon.

NOVA ESTRARO EN ESPERANTO-SOCIETO RIJEKA

En decembro de la jaro 2024 Esperanto Societo **Rijeka** ricevis novan estraron. La novelektita prezidanto estas **Emil Hrvatin**, laboranta kiel lerneja pedelo. La vicprezidanto estas **Luka Kik**.

Luka Kik

RONDA TABLO PRI LINGVOJ KAJ ARTEFARITA INTELEKTO EN SARAJEVO

Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino la 21an kaj 22an de februaro 2025 okazigis rondan tablon de trideko da lingvistoj kaj inĝenieroj pri Artefarita Intelektio. La aŭspicianto (kaj financanto) de la Ronda tablo estis Federacia Ministerio pri Edukado kaj Scienco, kies ministrino d-ro **Jasna Duraković** malfermis la eventon en Elektroteknika fakultato. Pri la program zorgis **Edin Čolić**, la sekretario e la Ligo.

Esperantisto kaj profesoro de Elektroteknika fakultato **Samir Ribić** enkondukis la prelegaron de la unua tago per malsekretigo principojn de la laboro de komputiloj. **Federico Gobbo** el la Universitato de Amsterdamo de la dua tago parolis pri la apliko de artefarita intelekto en universitata edukado. La dekanato de la Elektroteknika fakultato d-ro **Jasmin Velagić** prezentis la novformitan studon pri artefarita intelekto, la unuan tiaspecan en la regiono.

Konklude prelegantoj akcentis ke necesas daŭrigi interdisciplinajn traktadojn de la fenomeno de artefarita intelekto.

La fakan tradukadon prizorgis **Ankica Jagnjić** kaj **Jovan Zarković**.



LA DUA ADRIA SOMERUMADO EN PRVIĆ LUKA EN JUNIO

Dokumenta Esperanto-Centro post la lastjara sukcesa okazigo de la 12-a Kroata Esperanto-Kongreso sur la insulo **Prvić** decidis ankaŭ ĉi-jare proponi feriadon en **Prvić Luka** de la 21a ĝis la 28a de junio de 2025. Aliĝis dudeko da esperantistoj el pluraj landoj, inter ili **Saša Pilipović** el **Serbio** kun sia gitaro. La etoso evidente ne mankos en la tranoktejo kaj manĝejo **Požega**, kiun pluraj ekŝatis en 2024.

S.Š.

PETRA HEISINGER KUN ESPERANTISTOJ

Petra Heisinger kiel infano kreskis en la familio de geesperantistoj kaj tie ricevis pozitivan sintenon al Esperanto, kiun ŝi renkontis hejme. Ŝi fariĝis flutistino, estrino de muziklernejo, patrino de du infanoj, konsilantino pri nutraĵo...kuraĝulino La 12an de februaro 2025 ŝi prezentis al esperantistoj sian libron *Mi estas Petra, vi ne rompos min*. En la libro ŝi prezentas interalie sian emancipiĝon de la edzo, prestiĝa advokato, kiu rifuzis kontribui al edukiĝo de infanoj kaj ŝian vivemancipiĝon ĝenerale. Ŝi trovis tre bonvoleman publikon en Esperanto-Societo "Tibor Sekelj".

S.Š.




Petra kun esperantistoj. Fotis: Ivan Špoljarec

NOVA LIBRO DE FARUK ISLAMOVIĆ PRI LA RIVERO JADOVA

Nia membro **Faruk Islamović** ŝatas riverojn. Pluraj el ni ŝatas riverojn sed neniuj kiel li: li detale esploras ilin kun sia amiko **Nikola Cetina** kaj publikigas informojn pri ili, plej ofte en konata geografia revuo *Meridijani*. Ĉi foje li esploris la riveron **Jadova** en **Lika**, la riveron de la infanaĝo de lia amiko **Nikola Cetina**, kiu prizorgis la fotojn de la malpli konata rivero. Ĉe la rivero interalie arkeologoj elfosis etan ĉevalon el sukceso kiu tra la sukcesa vojo iam antaŭ jarcentoj de nia historio atingis la regionon kaj verŝajne estis enterigita kun sia posedanto. Kiam en **Litovio** okazis ekspozicio de sukcesaĵoj kiuj forveturis el tiu norda regiono al la direkto de **Mediterraneo**, ankaŭ la eta ĉevalo de Jadova revenis al sia nasko regiono.

Faruk lernis Esperanton ĉe **Ana Berc** kaj estis prezidanto de Studenta Esperanto-Klubo. Lia unua libro havis la titolon *Ekskurso al Bosanski Brod*, (kie li naskiĝis.)

S.Š.



SPLIT

La 8-an de aprilo okazis en Urba biblioteko *Marko Marulić* en **Split** abunda programo okaze de la 103a datreveno de fondiĝo de Esperanto-Societo Split. Kadre de la programo estis prezentita informlibreto *Esperanto - jezik za sve* kaj la nova dulingva poemlibro de **Luca Cetinić** *Srcem ispisano / Elkore verkita* (eldono de DEC, Đurđevac). En la programo, kiun gvidis **Darija Budiša**, partoprenis lernantoj de muziklernejo *J. Hatze*.

IŠ



NOKTO DE MUZEOJ EN KEL

Kroata Esperanto-Ligo la unuan fojon partoprenis en la kultura programo Nokto de muzeoj, kiu jam la dudekan fojon, okazis la 31an de januaro. Ekde la 19a ĝis la 23a horo al la ejo alvenis 57 partoprenantoj kiuj dum kelkaj eroj auskultis pri la historio de Esperanto en Kroatio (prelegis Spomenka Štimec), kantojn en Esperanto de Neven Mrzlečki kaj la enkondukan lecionon en Esperanto de Đivo Pulitika. Bela koktelo kompletigis la etoson. La unuan fojon bonveniganto estis Višnja Katalinić.

S.Š.

Fotis: Ivan Špoljarec



ZORA HEIDE - 100 JARA

En la zagreba hejmo por maljunuloj okazis kun granda programo la 22an de novembro 2024 grava festo: la centa vivjubileo de la esperantlingva poetino Zora Heide. Naskita en Levinovac ĉe Virovitica, Zora knabinaĝe lernis Esperanton de sia patro Mijo Vinceljak, vilaĝa instruisto. Ŝi ekstudis juron, sed la Dua mondmilito interrompis la studojn. Ŝi fariĝis laboratoria teknikistino kaj eklaboris. En la sesdekaj jaroj Esperanto fariĝis por ŝi edzperanto kaj ŝi ekvivis en Kopenhago kun ŝia dana edzo. Poste ŝi translokiĝos al Svedio kaj poste al Islando. Poligloto, ŝi fariĝis membro de Dana verkista asocio kaj poste de Sveda verkista asocio. Ŝi membris en Esperantlingva verkista asocio kaj Akademio Literatura de Esperanto. La tutan vivon ŝi verkas poemojn kaj prozon, abunde eldonas. Ŝi esperantigis multajn verkojn el la kroata literaturo. Ŝia poezia verkaro estis en la fokuso de la pasintjara Zamenhof-taga festo kiam oni festis ankaŭ „la aliajn poetajn centjarulojn“ Marjorie Boulton kaj William Auld.

Spomenka Štimec enmanigas florojn al la jubileanta Zora Heide.
Fotis Dubravko Toplak



KROATAJ ESPERANTISTOJ ĈE LA SOMERAJ KONGRESOJ

Pluraj kroataj esperantistoj planas en somero al Universala Kongreso de Esperanto en **Brno** en Ĉeĥio. Nia membro **Jelena Lončarević** lastatempe revenis el **Brno**, kie ŝi partoprenis en la Renkontiĝo de poliglotoj. Universala Kongreso de Esperanto okazos en **Brno** de la 26a de julio ĝis la 2a de aŭgusto 2025. Por la eksterlananoj kiuj havas malfacilaĵojn pri elparolo de la nomo **Brno** estis akceptita speciala nomo de la Kongresa urbo **Burno**!

Antaŭ **Brno** instruistoj-esperantistoj renkontiĝos en **Beograd** por sia jara kongreso de la 19a ĝis la 26a de julio 2025. Nia membro **Višnja Katalinić** anoncis prelegon pri la aŭstra verkisto **Clemens Johann Setz** kaj lia libro pri planlingvoj *La abeloj kaj la nevidebla*.

S.Š.



Mladen Belicza

ESTI KUNE

Esti kune kiam estas malfacile
 Esti kune kiam oni militas
 Esti kune kiam oni malsanas
 Esti kune kiam okazas paco
 Esti kune kiam okazas ne-paco
 Esti kune kiam kaoso okazas
 Esti kune kiam urĝo ĉe-nazas
 Esti kune kiam venas amo
 Esti kune kiam mankas salamo
 Esti kune estas la plej granda afero
 Kiam vi maljunas – jen la vero.

Esperantigis: Spomenka Štimec



Fotoj: Ivan Špoljarec - Štef